

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 14/01/2021 Kvincentdektria eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



Entute **887,700** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **291,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **230,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **217,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **49,700** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)


Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde majo 2021)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

EKSTRAĴOJ ĈE LECIONO 18 DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).

N.ro 18 de "Por Komencantoj".



La tria Voĉo estas la Mediala. En ĝi oni rigardas el de la fino retroen, same kiel en la Pasiva Voĉo. Oni do komencas per "La ŝtono", sed oni post la verbo ne plu rigardas, do ne plu scias ĉu ekzistas aŭ ekzistis origina aktiva aganto. Por montri ke oni rigardas retroen sed ne plu, la Verbo ricevas la sufikson "-iĝ-", do "La ŝtono laviĜAS", La antaŭa Adjekto restas: "La ŝtono laviĝas SUR LA MARBORDO." . Sed montriĝas nenia indiko, ĉu kaj kiu aŭ kio faris la originan agon "lavi". Ĝi



okazas kvazaŭ per si mem. Aŭ la parolanto ne volas malkaŝi tiun misteran aŭ ne plu ekzistantan aganton. En la Medialo la nova Subjekto kvazaŭ faras mem la pasivan agon al si.

Tiu Mediala Voĉo estas populara en la jura sistemo, ĉar oni povas diri ke aspektas ke okazis murdokrimo sed oni ne scias aŭ ankoraŭ ne volas diri kiu faris la eventualan krimon. Ĝi NE estas Refleksiva Modo, kiel malĝuste asertas francaj Esperantologoj.

Ekzemploj: "La kunveno finiĜIS", "La vetero pliboniĜOS", "La afero pliklariĜAS al mi".

Marcel Leereveld.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Homoj protektas aliulojn per la surporto de masko



Pri, pri, pri la antaŭa artikolo de Marcel, **Mia Dio**, en AE512

Vi pravas, kara Marcel, intence mi ne respondis viajn pensojn pri la tiel nomata krueleco de Dio ĉar temas miaopinie ĉefe pri privata afero al ĉiu unuopulo sed mi leteris al Trevor por lerni la Esperanto-vorton por la angla termino: THEODICY. Li pli ol adekvate tuj difinis en tamen longeta frazo opiniante ke tiu gravega koncepto ne ekzistas unuvorte en la Zamenhofa lingvo. (Parenteze, Lidia Zamenhof esperantigis la bahaan klarigon el la plumo de Abdul Baha pri la *NEEKZISTO DE MALBONO* kies unu frazo jenas: "Ĝusta klarigo de ĉi tiu objekto estas tre malfacila. Sciu, ke estas du specoj de aĵoj: materialaj kaj spiritaj, percepteblaj per la sentoj kaj intelektaj." Vd: *RESPONDOJ DE ABDUL BAHĀ (LXXIV)*)

<https://klausjames.tripod.com/respondoj5.html>

Do jen estas neologismo mia por pridiskuti ĉiliste TEODICION. Pardonon, mi scias ke neologismoj al vi ne plaĉas. Bob tamen al viaj ideoj bonege jam respondis jene: Por senkulpi tiujn kiuj profitas de militoj oni inventis la diablon kies potenco supozeble similas al la Dia. (Komplika tamen estas tiu longa historio ĉar Jesuo, Moseo, Abrahamo kaj aliaj Di-senditoj, kiel ekzemple Mahometo kaj Budho, ja referencis diablojn sed en superstiĉaj tempoj principe por analfabetaj kredantoj kaj bonuloj.)

Alidirite karaj instruistoj (jam dum 30 jaroj vi sperte kaj sinofere al mi instruas Esperanton, t.e. la lingvo de la monda paco):


(a): "La kulpo, kara Brutus, ne estas en niaj steloj / Sed en ni mem, ke ni estas 'underlings'"

(Wells: 'subuloj', Google: 'subalternuloj')." *Julio Cezaro*, Akto I, Sceno 3

(b) vidu ekstrakton (p. 59) de la senpaga E-varianto de mia libro:

<https://www.yumpu.com/es/document/read/10266523/realigas-la-mondan-pacon-la-bahaa-kredo-kaj-esperanto>

"Akceptinte ke ni ekiras la vojon senliman de la scienco, ni sen orgojlo rekonu ke ni scias preskau nenion. Ju pli mi lernas des pli mi agnoskas mian sencion, des malpli mi pretendas scii Diajn misterojn. Ne ni - sed Li - estas la senerara Juĝisto. Nur tiu kiu estas la partnero de Dio insistus ekzemple, ke Dio ne havis rajton allasi naziajn ekstermejojn. Nia devo estas montri malbonegajn agojn de la naziistoj, emociĝi simpatie antaŭ la mizero de ĉiu viktimo kaj helpi ilin. Plie nia ĉefa tasko estas batali por



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

malebligi similajn kaj aktualajn krimojn kontraŭ la homaro. Tamen, abomenaj faritaĵoj de homoj [latine: *homo homini lupus*] neniel pruvas la foreston de Dio, samkiel ŝajne idilia vivo de riĉuloj en tropika paradizo ne pruvas Lian proksimecon tie."



\$2:00 en la anglalingva originalo sur p. 58:

https://gumroad.com/l/making_world_peace_real/

Amike via Paulo (ne la Apostolo)

Paulo Desailly



Ho Mia Di'- ne permesu tiun miksaĵaĉon/miksaĉaĵon!

Njusaŭtvelso: kia malagrabra neologismo! La traduko de *New South Wales* estas NovSudKimrujo, kaj mondvaste ĉiu komprenas tiun esprimon. La abomeninda neologismo tute ne sonas kiel la anglaj vortoj, nek skribe similas ilin, do, neniu ekster Aŭstralio komprenus ĝin. Kio estas la problemo kun la simpla, rekta traduko?



Vera Payne



Serioza sindediĉo por la lingvo | Esperanta Retradio



Klaku supren kaj aŭskultu al bona progamo kaj kun la suba video

Jen ankoraŭ aktuala, esperiga ekzemplo pri juna kapabla virino kiu aperas en memproduktita filmeto pri la politika situacio en Usono: Esperanta lingvo, anglaj subscriboj.

<https://www.youtube.com/watch?v=2ZZmTXJrcQg&feature=youtu.be>



La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



<http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine>



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Krei diojn kaj spiritojn.



KIAL KAJ KIEL LA HOMOJ KREIS DIOJN KAJ SPIRITOJN ?

La scienco multe helpas nin klarigi al ni kio okazas nun, sed ĝi devas esti malklara pri kio okazis antaŭ milionoj da jaroj. Pro tio mi kaj ĉiuj aliaj estas same malklaraj pri tio. Ne utilas al mi, proklami ke vi malĝustas pri viaj kredoj pri la malnovaj tempoj, sed mi povas almenaŭ priskribi miajn fortajn supozojn pri kial kaj kiel la homoj komencis kaj daŭras krei diojn kaj spiritojn.

Jam la primitivaj homoj havis malsaman cerbfunkcion ol la aliaj animaloj. Pro tio ke ili devis lerni, pro siaj manoj, elekti diversajn manierojn por fari aŭ konstrui, ili lernis rezoni. Kaj ili

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

lernis pli kaj pli diversigi la kampon de siaj agoj kaj kreoj. Ili povis lerni multe pli da diversaĵoj ol la aliaj animaloj, kiuj tre kaj pli kapabliĝis sed nur en la limigoj de la funkcioj de siaj korpopartoj. Elektado, konstruado, kreado, kaj diversado fariĝis ilia forteco. La enhavo de ilia cerbo riĉiĝis same, kaj rezonado kaj juĝado fariĝis ĝia forteco. Tiom multe, ke ili eĉ iomete malzorgis sian dependon de la naturo ĉirkaŭ si.

Unu problemo kiun ili deziris solvi estis la ekzisto mem de la mondo. Kiel kreantoj de parto de sia vivo ili aŭtomate atendis ke la mondo estis kreita, same kiel ili mem kreadis. En sia menso, por krei ion, la homoj bezonis homsimilan estaĵon, kiun ili nomis dio. Sed ĉar ili ne povis vidi tian estaĵon, ili devis imagi ĝin, kaj imagis ĝin estanta kvazaŭ homo, vira homo. Samtempe ili bezonis regulojn por kune vivi, ĉar la naturo ne donis tiajn al ili. Kaj lerte ili kombinis kaj la ekziston de dio kaj la bezonon de sociaj reguloj al sistemo kiun ili nomis “religio”. Pro tio la strangeco de la duopeco de la signifo de la vorto “religio”. Tio estis tre utila por “solvi” du problemojn solvendajn, laŭ ili. Sen tio ilia socia vivo estus ĥaosa. Do la loke kaj tempe diversaj religioj kreiĝis, aŭ kreadis, de la multaj homaj rasoj. Ili fariĝis, antaŭ la ŝtataj leĝaroj, la oficialaj leĝaroj, diversaj laŭ la lokoj kaj la periodoj. Sed la funkcion de la leĝaroj transprenis la ŝtatoj kaj la funkcion de la kreo kaj de la ekzisto de la mondo transprenis la sciencoj, kaj restas nur la homaj moralaj reguloj kaj la eklezioj kun siaj mitoj.

Samas pri la “spiritoj”: science oni ne trovis memstarajn spiritojn duonvoje inter la homoj. Kaj nenio kion homo spertis per vidado, aŭdado, sentado, flaro kaj imago povas memstare eniri en la cerbon de alia persono sen ties aŭdado, vidado, sentado, flarado, aŭ imagado. Mi suspektas ke la jam primitiva homaro inventis la ideon pri “spiritoj” por povi klarigi la kreiĝon kaj agadon de sanktaj libroj kaj de apostoloj kaj de profetoj.

Do religioj kun siaj dioj kaj profetoj kaj spiritoj estis tre gravaj kaj utilaj por la disvolviĝo de la homaro, kaj ne povis toleri kontraŭulojn, eĉ ne aliajn religiojn. Ĉar ili ne plu bezonatas, ili fariĝis sentimentalaj kaj personaj, kaj traktatu kiel personaj sentoj ne publike priparolendaj, same kiel sentoj interfamilianaj kaj interseksaj. Sed ĉe la flankoj, kaj ankaŭ tute ĝenerale, oni diskutas, kaj devas diskuti, pri ili. Eĉ en ESK: sentoj pri animaloj kaj pri religioj. Kaj en A.E.: specoj de dioj kaj danĝeroj de religioj. **Marcel Leereveld.**

DANĜERA ANGLISMO .

La angla lingvo uzas lingvaĵon kiu estas en Esperanto evitinda ĉar aliaj lingvoj ne uzas ĝin, kaj ĉar ĝi estas malĝusta. Kelkfoje ĝi eĉ havas du malsamajn signifojn, eĉ en la angla: *I like that person to be elected* = Mi ŝatas tiun personon elektotan kaj Mi ŝatas ke tiu persono estu elektota. En la unua kazo mi ŝatas la personon kaj ne necese la elektadon kaj en la dua kazo mi ŝatas la elekton kaj ne necese la personon. En Esperanto kaj aliaj lingvoj oni povas diri nur “Mi ŝatas la personon elektotAN = la elektotan personon”. Por la alia signifo oni devas diri “Mi ŝatas la personon elektotA” aŭ (pli klare) (Mi ŝatas ke la persono ESTU elektota”.

La afero eĉ pli komplikas ĉe la angla verbo “*know*”, kiu signifas KAJ scii KAJ koni: “*I know her to be pregnant*” = “Mi KONAS ŝin gravedA” (= kiel gravedan) kaj “Mi SCIAS ke ŝi estas gravedA”.

. La angla formo estas malĝusta, ĉar en ekz. “*I LIKE HIM to get out of my sight*” mi tute ne ŝatas lin (*I do NOT like him*). Diru “Mi ŝatas, ke li eliru el mia vido”. Se ankaŭ aliaj eŭropaj

lingvoj enhavus la anglan esprimon, Zamenhof (kaj speciale la eŭropaj Esperantistoj) eble estus akceptantaj la strangan esprimon. **Marcel Leereveld.**

RESPONDO AL PAŬLO .

Ŝajnas al mi, ke ni parolas per du malsamaj langoj: Mi penas simpligi la ideojn kaj ci (kaj bahaanoj) penas malsimpligi la ideojn. En cia kazo, ci kreas pli kaj pli da variaĵoj de la ideoj. Jam en cia dua frazo tio komenciĝas per “ĉar temas ĉefe pri privata afero al ĉiu unuopulo” kaj la posta mencio de “la neekzisto de malbono” kaj de la strangaĵo “ĝusta klarigo de ĉi tiu objekto estas tre malfacila”. Ĝi povas esti malfacila por Abdul Bahan, sed ne por mi, ĉar oni povas same bone retroigi la strangaĵon al “Dio ne povas ekzisti ĉar malbono ekzistas”. Cetere, se ci hezitas klarigi mian privatan opinion, kial ci riĉe klarigas cian privatan opinion pri la sama temo? Mi ĝuis legi ĝin, sed ĉiu dua vorto indikas aprioran ideon kiun mi legante devas pruvi senbaza, eĉ se Abdul mencias ĝin. Sed kiel mi povas peti cin doni klarigon por ĉiu el la dekoj da prioraĵoj? Alie ol en la komenco de cia ĵussemajna letero, la nuna entenas nenium pruveblan opinion, eĉ ne vage pripensita pri ĝia ekzisteblo. Do la tuto estas bela rakonto pri ciaz afablaj imagoj personaj sed neniel verŝajnaj. Kaj mi legas la tuton kiel belan romanon, ne kiel seriozan prognozon. Inkluzive de la belaj revoj de la t.n. kleruloj pri religioj. Se ci nur estus pruvinta cian ĉiun duan vorton! Kaj se ci nur ne estus kredeme kaj aŭtomate akceptinta ĉion kion la evidente erarintaj kleruloj rakontas. Sed eble kaj espereble tiu kuraĝa tempo venos. Sed memoru: Mi ĝuis legi la rakontojn ciaz. **Marcel.**

RESPONDO AL BOB.

Mi ĝojis legi ciaz rakontojn pri imagitaj spiritoj kaj dioj ege neverŝajnaj, formantaj belan novelon. Mi ne havas la kapablon imagi kaj verki belajn romanojn. Kaj certe ne pri strangaj spiritoj kaj dioj. Amuzu nin plu! Dankon! **Marcel.**

RESPONDO AL ROGER.

Cia devizo Kredi egalas al “ne scii”, povas teksti ankaŭ “Scii egalas al ne plu kredi”. Ĉiutage dum sia disvolviĝo la homoj ricevis pli da scio, kaj perdis kredadon. Jam mia avo perdis la kredon en la katolikan Dion. Sed oni ankaŭ kreis novajn kredojn, religiajn kaj politikajn, ĉar la homaro ankoraŭ preferas esti gvidata, pro mallaboremo. Tio estas miaj opinioj. **Marcel.**

MIA KOMPREENO DE LA SIGNIFO DE LA VORTO “SPIRITO” .

“Spirito” = Bildo en la cerbo tradukita al lingvo, precipe per vortoj, kaj tiel vojaĝpova de unu persono al la cerbo de alia persono kiu konas la saman lingvon kaj kiu tial vidas en sia cerbo la saman aŭ similan bildon.

Sekve “spirito” estas materia afero (estas dubinda, ĉu en nia universo ekzistas nemateriaj aferoj).

Konsekvence la spirito plene vojaĝas inter du aŭ pli da personoj kiuj parolas la saman vortan lingvon (do tio substrekas la gravon de Esperanto).

Ĉi tiu signifo ekskluzivigas ĉiujn aliajn signifojn de la vorto “spirito”, ĉu materiajn ĉu t.n. “spiritajn”. **Marcel Leereveld.**



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Pri homoj kaj bestoj

Kun intereso legis mi la artikolon de Bob Felby en la Australiaj Esperantistoj n° 512. Mi komprenas kial Bob instigas ĉiun fariĝi vegetarano . Fakte laŭ lia priskribo ne estas diferenco inter viandmanĝanto kaj kanibalo , se ĉiu besto estas homo, kiu malbone kondukis en antaŭa etapo de sia vivo. Kanibalismo ne plu akcepteblas ie ajn en la mondo ! Tamen mi preferas konsideri la bestojn kiel estaĵojn kun similaĵoj kaj malsimilaĵoj kompare kun homoj. Ni ĉiuj samgrade apartenas al la naturo kaj bedaŭras ke ĉefe tra religio daŭras en la menso de multaj homoj la hierarkion formaligitan de Aristotelo. Kun la nunaj sciencaj malkovroj de la inteligenteco kaj komunikkapablo de bestoj kaj plantoj eble venis la tempo revizii sian mondkoncepton.

Franciska Toubale



3ZZZ

...En la elsendo de la 11a de januaro 2021 aŭdeblas la dua parto de la prelego de Albert Garrido pri la filipina lingvo , respondoj de Zamenhof pri la uzo de la adverbo aŭ la adjektivo en frazo kiel "estas varme/varma." Ĝi ankaŭ enhavas pli distrajn erojn :la blaga blogo de Viktoro Sole, komentoj pri la ludo domeno kaj pri katedraloj

....Franciska Toubale



LIBERA PAROLO. Kiuj kontrolas Sinesprimliberecojn?

Sinesprimlibereco estas principo, kiu subtenas la liberecon de individuo aŭ komunumo vortigi siajn opiniojn kaj ideojn sen timo al reprezalio, cenzuro aŭ jura sankcio.

Sen novaj opinioj la homaro stagnos. Sen informo, la homaro estas sklavo.

Kiuj kontrolas la informojn/ideojn kiuj estas taŭgaj por la popolo ?

La novaĵmedio ? la interreto ? La sociamedio ? La registaro ?

Nun eĉ la Prezidento de Usono estas nepermesata uzi la reton por informi siajn legantojn pri siaj pensoj aŭ ideoj.

Memoru Julian Assange.

Roger Springer



Interesaj faktoj por Propagando

.Lernado de fremda lingvo postulas

Lernu legi la skribitan lingvon. Ofte ĝi ne agordiĝas kun la parolata lingvo...

Lernu la gramatikon. Ofte ĝi estas plena da esceptoj al la reguloj.....

Lernu vortliston taŭgan por via espera uzo.....

Lernu la standardan prononcon. Ofte ne agordas kun la parolata lingvo..

Lernu la lokan parolatan lingvon.....

Lernu la ĉiutage mallongigitan parolatan lingvon.....

Lernu la idiomojn de la lingvo

Lernu kiel kompreni la parolatajn respondojn al viaj demandoj.....

Komparu Esperanton

..Fonetike senescepta

..17senesceptaj reguloj

..Kunmetitaj vortoj

..Unu prononco

..Ne ekzistas

..Ne ekzistas

..Ne ekzistas

..Unu monda lingvo

Esperanto ne havas tiujn malfacilaĵojn

La plej multaj Esperantistoj lernis Esperanton kiam ili estas plenkreskaj.

Do ili estas tre toleremaj kaj helpemaj al lernantoj

Roger Springer

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE